

VICENTE INGLADA



En la
Barcelona Kongreso

Unuakta aktuala komedioto



Federación Española de Esperanto
Hispana Esperanto - Federacio
Rodríguez San Pedro 13 - 3º - 7, E-28015 MADRID
Tel. +34 - (9)1 - 4468079

PEDRO NARANJO TERAN
DEL^{to} DE U.E.A.
JEREZ DE LA FRONTERA
(HISPANIC)

J. Espasa é Hijos
Editores

BARCELONA
Cortes, 579

2880

OBRAS LITERARIAS EN ESPERANTO

ORIGINALES Ó TRADUCIDAS DE OTROS IDIOMAS

De V. INGLADA

- Kuracisto per batoj (*El Médico á palos*), de Moratin. (*En prensa la 2.ª edición.*)
Prozo kaj versoj (colección de textos originales en prosa y verso). Precio, 2 ptas.
La nesia hejmo (*El nido ajeno*), comedia en tres actos, de J. Benavente. Precio, 1 franco.
Kruela adiaŭo (*Despedida cruel*), comedia en un acto, de J. Benavente. (*En prensa.*)
La Angora katino (*La gata de Angora*), comedia en cuatro actos, de J. Benavente. (*En prensa.*)
Triumfanta animo (*Alma triunfante*), drama en tres actos, de J. Benavente. (*En prensa.*)
La malbonfarantoj de la bono (*Los malhechores del bien*), comedia en dos actos, de J. Benavente. (*En prensa.*)
La manĝaĵo de la sovaĝbestoj (*La comida de las fieras*), comedia en tres actos y un cuadro, de J. Benavente. (*En prensa.*)
La maleganteo (*Lo cursi*), comedia en tres actos, de J. Benavente. (*En prensa.*)
Princino Bebe (*La princesa Bebé*), escenas de la vida moderna en cuatro actos, de J. Benavente. (*En prensa.*)
Pli forta, ol amo (*Más fuerte que el amor*), drama en cuatro actos, de J. Benavente. (*En preparación.*)
La sabata vespero (*La noche del sábado*), comedia en cinco actos, de J. Benavente. (*En preparación.*)
La esprita junkro Don Kihoto de Mandujo (*El ingenioso hidalgo Don Quijote de la Mancha*). (*En preparación.*)
La griza vilaĝo (*El poble gris*), per Santiago Rusiñol. (*En preparación.*)
Bonaj personoj (*La bona gent*), obra en quatre actes, de Santiago Rusiñol. (*En preparación.*)
La Galeotoj (*Los Galeotes*), comedia en cuatro actos, de S. y J. Álvarez Quintero. (*En preparación.*)
La ekspresa vagonaro (*El tren expreso*), poema de R. Campoamor, traducción en verso. (*En preparación.*)
En la Barcelona Kongreso, unuakta aktuale komedieto. Precio, 25 céntimos.

De R. DUYOS

- La barako (*La barraca*), de Blasco Ibáñez. (*En preparación.*)
Inter oranĝarboj (*Entre naranjos*), de Blasco Ibáñez. (*En preparación.*)

De A. JIMÉNEZ LOIRA

- La perfekta edzino (*La perfecta casada*), de fray Luis de León. Precio, 2 pesetas.

De A. SABADELL

- La patrio (*La mare*), de Santiago Rusiñol. Precio, 2 pesetas.
Folioj de la vivo (*Fylls de la vida*), de Santiago Rusiñol. Precio, 1 peseta.
La blua korto (*El Pati blau*), de Santiago Rusiñol. (*En prensa.*)
La Gama Kantajo (*La canço de sempre*, dialect), de S. Rusiñol. Precio, 10 Sd.

Los pedidos de estas obras pueden hacerse á los autores respectivos: *Vicente Inglada*, Estación Sismológica, Toledo. — *R. Duyos*, Mar, 2, Valencia. — *A. Jimén*, Pintor López, n.º 3, Valencia, y *A. Sabadell*, Diputación, 280, Barcelona.



Federación Española de Esperanto - Federacio Hispana Esperanto - Federacio

Rodríguez San Pedro 13 - 3º - 7, E-28015 MADRID
Tel. +34 - (9)1 - 4468079

EN LA

BARCELONA KONGRESO



2880

16x1995hel002880pu



EN LA

BARCELONA KONGRESO

UNUAKTA AKTUALA KOMEDIETO

ORIGINALE VERKIS •

VICENTE INGLADA

STABA KAPITANO KAJ GEOGRAFIA INĜENIERO



BARCELONA

TIPOGRAFÍA DE JOSÉ ESPASA É HIJOS, EDITORES

579, CALLE DE LAS CORTES, 579

—
1910

GRAVA ANTAURIMARKO

La celo de tiu ĉi komedieto estas nur amuzi la publikon dum kvaronhoro. Eŝceptante kelkajn amikojn, kiujn mi citis per iliaj propraj nomoj (S-roj Grabowski, Jiménez Loira, Piñó, Perogordo, Duyos, Marzal kaj Novejarque, kiuj bonvolos pardoni al mi tiun liberecon), mi neniun intencis aludi en tiu ĉi senvalora verketo. Mi do tre bedaŭrus, se iu povus ofendiĝi tralegante «En la Barcelona Kongreso», kaj tial mi faras tiun ĉi sinceran publikan deklaron, esperante ke ĝi sufiĉos por eviti tiajn malagrablojn.

PERSONOJ

KIPMAN, anglo. Juna kaj tre lerta Esperantisto. Li sercas ofte per delikata ironio kaj afableco neriproĉinda.

MORENO, hispano. Ankaŭ juna kaj tre lerta Esperantisto. Ĉiam gaja kaj bonhumora, li nur atentigas la agrablajn flankojn de la vivo. Tre ŝercema viro.

LOPEZ, juna hispano. Oni ne povas nomi lin Esperantisto, ĉar li nur konas kelkajn vortojn de la lingvo internacia. Malgraŭ sia nescienco li kuraĝe parolas kun ĉiuj renkontataj fremduloj per laŭta voĉo kaj per movoj de la brakoj, kiuj volas helpi al la nekomprenebla eldirado de la buŝo.

KARDONA, hispano. Juna kaj lerta Esperantisto, defendanta Idon.

BOLIN, juna, franca Esperantisto.

IU AJN, kiu petas aŭtografojn por sia kongreslibro.

EN LA BARCELONA KONGRESO

SCENO UNUA

La agado havas lokon en la korto de la Barcelona Universitato dum la V^a Kongreso de Esperanto. Estas ĉirkaŭ la 10.^a horo matene kaj la korto aspektas tre vigle, ĉar ĝi estas plena je grupetoj da Esperantistoj, kiuj gaje habilas atendante la komencon de kunsido de la Universala Esperanta Asocio. Unu, tanke oni vidas tablon, apud kiu sidas S-roj Piñó, Marzal, Novojarke, Vila kaj alioj, kiuj zorgas pri la enskriboj de Esperantistoj por la Valencia Postkongreso. En alia flanko tablo-vendejo de esperantaj objektoj (steletoj, pingloj, libroj, broŝuroj, horloĝoj, k. t. p.) Sur la muro granda afiŝo kun anonco pri la prezentado de «Mistero de doloro». Knabo vendas numerojn de gazeto «Jen» kaj de ĵurnalo «Esperanto». Kelkaj urbogardianoj serioze kaj silente pasadas tra la korto. Ĉiunmomento eniras kaj eliras geesperantistoj. Kelkfoje la grupetoj ĉesas habili kaj sandirekten rigardas. Ĝi estas, ĉar D-ro Zamenhof venas aŭ ia belega fraŭlino. En la antaŭa parto de la scenejo habilas S-roj Kipman kaj Moreno kiam la rulkurteno levigas.

KIPMAN

Post kelkaj jaroj de amika korespondado mi havis grandan deziron interkonatiĝi kun vi persone, S-ro Moreno. Mi estas tre feliĉa...

MORENO

Kaj mi ankaŭ, mia kara. Estas tre plezure paroli kun malnova amiko, kiel vi.

III AJN

(prezentas malfermitan kongreslibron kaj inkujo-plumon al S-ro Kipman.)

Sinjoro, mi petas, mi petegas... Se vi estus tiel aminda... Se mi havus la feliĉon... Mi estus al vi plej kore danka, se vi bonvolus honoriti min ĉi mian modestan kongreslibron per la skribo de via eminenta aŭtografio... Mi eterne restus...

KIPMAN

(interrompante lin, ĉar alie S-ro In ajn estus parolanta ĝis la malfermo de la VI^a Kongreso.)

Sufiĉe, Sinjoro, sufiĉe *(imitante lian petadon.)* Mi havos la altan nemerititan de mi honoron skribi mian modestan, senvaloran, sensig-

nifan aŭtografon sur la belan paĝon de tiu ĉi nova eleganta kongreslibro, kaj mi ĉiam restos al vi plej kore danka, ĉar... (*Dirante tion ĉi li penas skribi, sed malfeliĉe la inkujo-plumo ne bone funkcias kaj estas neeble fari per ĝi eĉ unu signeton. Li klinas la plumon malsupren, supren, dekstren, maldekstren, en ĉiujn eblajn direktojn, sed senrezultate. Li skuas ĝin hejkafoje, unue delikate, poste perforte, sed nenio helpas, la plumo obstine gratas la paperon, lasante nenian postsignon. Dume S-ro Iu ajn subtenas la libron en siaj manoj, atendante la surskribon. (Flanken.) Malbeninda plumo! Diablo forprenu vin kaj vian mastron! (Al S-ro Iu ajn aŝable.) Pardonu, Sinjoro, sed Ĝia Pluma Moŝto ne volas skribi...*

IU AJN

Ho, jes, Sinjoro. Pardonu min: mi estas senkapulo. Mi forgesis provizi la plumon per inko... Sed tio ĉi ne malhelpas, prenu kraĵonon. (*Proponas kraĵonon al S-ro Kipman kaj reprenas la plumon.*)

KIPMAN

Dankon. (*Bhskribas, sed la pinto de la kraĵono tuj derompigas. Kun bedaŭra preskaŭplora voĉo.*) Jen, Sinjoro, kia malfeliĉego! La kraĵonpinto rompiĝis kaj mi ne povis tute surskribi. Bonvolu kontentiĝi per mia duonskribo!

IU AJN

Ne, tute ne, Sinjoro. Mi kunportas dekduon da pretaj kraĵonoj. Prenu alian. (*Eliras el la poŝo alian kraĵonon kaj proponas al li.*)

KIPMAN

Bone, plej bone. (*Vine surskribas kaj redonas la kraĵonon.*) Jam via peto estas plenumita. Mi elskribis.

IU AJN

(*tegas la surskribon de S-ro Kipman kaj proponas ree al li la kraĵonon. Kun peta voĉo, hiel antaŭe kaj subtenante per ambaŭ manoj la kongreslibron*)

Pardonu, Sinjoro, mi devas vin ĝeni ankoraŭ; vi forgesis skribi vian profesion, la urbon kie vi loĝas, vian adreson... Estus al mi granda plezuro korespondadi kun vi post la kongreso...

KIPMAN

(*ion kolere reprenas la kraĵonon*)

Tre volonte, Sinjoro. (*Flanken.*) (Korespondadi kun mi? tiu ĉi obstina hurdo? Ne, tute ne, mia kara. Mi skribos sur vian kongreslibron adreson de alia samideano, kiu ne konas min kaj loĝas tre malproksime... ne, mi elpensos adreson tute malrealan.) (*Skribas kaj samtempe tegas laŭte.*) Kapitano... de... Artilerio.... Port-Arthur.... (Rusa... Azio...). Strato... Fredorowski... n.º 8ª... etaĝo 6ª...

IU AJN

Sesa etaĝo? Sendube la domoj en Port-Arthur estas tre altaj.

KIPMAN

Alteĝaj, Sinjoro.

IU AJN

Ĉu ili ne estis detruitaj de la kuglegoj dum la sieĝado de japanoj?

KIPMAN

Kelkaj, jes: mia loĝejo estis tute renversita kaj oni devis ĝin rekonstrui. Unu tagon mi estis ĉe la balkono, legante la «Virineto de maro». Subite mi aŭdas sibilantan venantan al mi kuglegon: ĝi forĉiris de miaj manoj la libron kaj detruis duonetaĝon.

IU AJN

Kaj ĉu vi ne mortis? Nenio malbona okazis al vi?

KIPMAN

Ne, Sinjoro, mi nur restis sen «Virineto».

IU AJN

Interesega afero! Ĉu vi povus rakonti al mi kelkajn scenojn el la sieĝado de Port-Arthur? Mi aŭdus ilin kun grandega plezuro.

KIPMAN (*Flanken*)

(Mi furiozas. Tiu ĉi malspritulo estas abomeninda. Kion mi diros al li?) (*Al S-ro Iu ajn*). La rakontado, kiun vi petas de mi, estas longa. Nun mi devas paroli kun S-ro Moreno pri urĝa afero. Se vi bonvolus reveni al mi...

IU AJN

Ĉu ŝajnas al vi bone, ke mi revenu tien ĉi por serĉi vin post duonhoru?

KIPMAN

Jes, plej bone. (*Flanken.*) (Post duonhoru mi estos je kelkaj kilometroj de la Universitato: vi, do, revenu!)

IU AJN

Mi, do, revenos tien ĉi.

KIPMAN

(Dank' al Dio, ke li tuj foriros!)

IU AJN

(*Prezantante al S-ro Moreno sian kongreslibron kaj kraĵonon*)

Ĉu vi ankaŭ, Sinjoro, estas tiel aminda... Ĉu vi bonvolos honori mian kongreslibron...?

MORENO

Plej volonte, Sinjoro. (*Prenas la kraĵonon kaj rapide skribus sian nomon kaj adreson, dum S-ro Iu ajn subtenas ambaŭmane la libron.*)

IU AJN (*Al S-ro Moreno*)

Dankon. (*Leginte la nomon kaj adreson.*) Ĉu eble, Sinjoro? Vi, do,

estas la fama horloĝisto el Valencio, la aŭtoro de la ĉiekonataj esperantaj horloĝoj? Kiel plezure!

MORENO (*Kun afabia rideto*)

Eble vi eraras. Mi ne estas horloĝisto, Sinjoro. Mi nur estas agento de asekuroj.

IU AJN

Kiel, Sinjoro! Ĉu eble?

MORENO

Jes, Sinjoro, mi certigas vin, ke mi estas agento de asekuroj: almenaŭ mi pretendas scii tion ĉi pli bone, ol vi. Vi sendube konfuziĝas.

IU AJN (*Eliras notlibreton kaj momente legas*)

Vi estas prava, Sinjoro; pardonu. Mi konfuzis vin kun S-ro Essieux, el Genevo. Kia bedaŭrinda afero! Vi, do, estas el Valencio? Vi sendube konas S-ron Marzal, tiea advokato?

MORENO

Jes, Sinjoro, mi lin konas.

IU AJN

Alta, simpatia junulo. Li loĝas en la sama hotelo, kie mi loĝas. Tre bonhumora, ĉiamgaja spritulo! En la hotelo li ne ĉesas ŝerci kaj li tre plaĉas al du aŭ tri fraŭlinoj, kiuj konas lin kaj ricevis lian vizitkarton kun portreto.

MORENO (*Flanken al S-ro Kipman*)

(Tiu ĉi horloĝo estas streĉita por unu monato, mia kara! Mi ne scias, kiam li ĉesos babilu.)

IU AJN

Ankaŭ el Valencio, mi konas S-ron Aŭgusto Jiménez Loira, Direktoro de «*La Suo Hispana*». Ĉu li ne venis Barcelonon?

MORENO

Ne, Sinjoro.

IU AJN

Ĉu vi scias, kial li ne venis?

MORENO

Tute ne, Sinjoro.

IU AJN

Eble pro malsano? Eble pro premanta okupado?

MORENO

Mi ne scias.

IU AJN

Kaj S-ro Duyos, li ankaŭ ne venis?

MORENO

Ne, Sinjoro. Li estas oficeiro kaj al ĉiuj hispanaj militistoj estas nun malpermesite veturi, pro la militado en Nordafriko.

IU AJN

Tamen, mi vidis hieraŭ S-ron Kapitanon Perogordo!

MORENO

Jes, jes, li venis tien ĉi. La simpatia kapitano Perogordo estas la diablo mem en persono. Li sukcesis ricevi forpermeson de Lia Ministra Moŝto. Se oni estus al li rifuzinta forpermeson, li jam havis pretan aerostaton por flugi Barcelonon. Ĉar la direktado de aerostatoj estas ankoraŭ nesolvita, li sendube estus senkulpiginta sin dirante: «La vento malgraŭ mia volo kondukis min en Barcelonon!»

IU AJN

Vi estas prava. S-ro Perogordo estas tre simpatia viro. Ĉiuj lin konas kaj amas. Se vi vidus lin ŝajnigante sin lamulo!

MORENO

Mi jam konas tiun ĉi lertecon de S-ro Perogordo. Li ankaŭ tre sprite rakontas historietojn.

IU AJN

Jes, jes. Mi ekkonis S-ron Perogordo en la Kembriga kongreso. Tie oni ankaŭ prezentis al mi tre amindan hispanon, S-ro Pino, advokato el Valencio, kiu ludis rolon en la prezentado de «*Ŝi kliniĝas por venki*» en Londono. Ĉu vi lin konas?

MORENO

Ne, Sinjoro.

IU AJN

Kiel? Ĉu eble? (*Mirigita.*) Li estas alta, bela junulo, kun nigraj lipharoj. S-ro Pino...

MORENO

Eu Valencio mi konas neniun pinon, se ĝi estus palmo... la afero jam ŝanĝiĝus, ĉar la klimato en Valencio estas tre varma. Mi ne scias pri kiu pino vi parolas. Ĉu eble pri la fama:

«En nord' unu pino en solo
Dormetas sur nuda altaĵo...»

IU AJN

Ne, ne. Mi parolas pri S-ro Pino Alegret.

MORENO

Ha, bone! Mi nun komprenas. S-ro Piñó Alegret. (*Elparolante hispane la nomon Piñó*) (1). Bone, bone, mi lin konas intime.

IU AJN

Ĉu li venis Barcelonon!

MORENO

Jes, Sinjoro.

IU AJN

Mi ne trovis lin ankoraŭ kaj mi deziregas lin vidi. Sendube li nun flirtadas apud fraŭlinoj kaj tial li estas nevidebla por amikoj. Ĉu vi povus diri al mi en kiu notelo li loĝas?

MORENO

Li nun estas je dudek paŝoj de ni.

IU AJN

Ĉu vere, Sinjoro?

MORENO

Ĉu vi vidas tiun tablon? (*Signas per la mano la tablon de kiu oni faras la enskribojn por la Postkongreso.*) Tie sidas S-ro Piñó, pretiganta ĉiujn detalojn por la Valencia Postkongreso kun S-ro Marzal kaj aliaj amikoj.

IU AJN

Dankon, dankon. Mi tuj kuras lin saluti. Adiaŭ, Sinjoroj. (*Al S-ro Kipman.*) Post duonhoro mi revenos tien ĉi por aŭdi vian rakonton (*Poviras.*)

SCENO II

S-ROJ KIPMAN kaj MORENO

KIPMAN

Dank' al Dio, ke li foriris! Li estas neelportebla. Tiu ĉi kutimo peti aŭtografojn estas terura.

MORENO (*Ridetante*)

Oni devas indulgi tiujn ĉi kolektantojn de aŭtografoj. Oni ne povas ilin forpeli, kiel muŝojn!

KIPMAN

Tre prave vi parolas. Sed estas tedege pasigi la tutan tagon kun

(1) Oni elparolu *Piñá*.

krajono en la mano skribante kaj reskribante sian nomon. En la proksima kongreso mi scios eviti tian malagrablaĵon.

MORENO

Kiel, Sinjoro?

KIPMAN

Mi portos ĉiam pendantan de butontruo kartoneton kun tiu ĉi anonco: «Mi ne scias skribi. Vane estas peti de mi aŭtoĝrafon.»

MORENO

Brave! Multaj Esperantistoj imitos vian ekzemplon. (*Avenas S-ro Kardona kaj alproksiniĝas al S-ro Moreno por lin saluti.*)

SCENO III

LA SAMAJ kaj S-RO KARDONA

MORENO

(*Stanken. Evoidante S-ron Kardona*)

(Mil bomboj! Jen tiu ĉi sentaŭgulo.) (*Al S-ro Kipman.*) Mia kara, hodiaŭ ni havas malbonan ŝancon. Tiu ĉi alvenanta Sinjoro estas Idisto.

KARDONA

Bonan tagon, Sinjoroj.

MORENO

Bonan tagon. (*Al S-ro Kipman.*) Mi havas la plezuron prezenti al vi S-ron Kardona, el Madrido... (*Al S-ro Kardona.*) S-ro Kipman, angla Esperantisto, membro de la Lingva Komitato. (*Ili salutas sin reciproke.*)

KARDONA

Estas por mi granda plezuro interkonatiĝi kun tia eminenta samideano. Ĝuste mi deziris jam de longe paroli kun Lingva-Komitatano.

MORENO (*Stanken*)

Tiu ĉi malsaĝulo komencos tuj paroli pri reformoj (*Ironie.*) Ĉarma afero! (*Al S-ro Kipman.*) Mia kara, ne koleru pri tiu ĉi viro. Li estas tre stranga kaj iom freneza. Havu paciencan.

KIPMAN

Sinjoro, mi estas je viaj ordonoj. Diru al mi ĉion, kion vi volos.

KARDONA

Mi estas malkaŝema viro. Mi komencos dirante al vi, ke mi estas Idisto.

KIPMAN

(Paras paŝon malantaŭen, prenas pozon de terurita persono kaj ripetas per tondra voĉo)

Idisto!!

KARDONA

Jes sinjoro, I-dis-to *(malrapide silabante la vorton)*. Ĉu mi diris ion eksterordinaran?

KIPMAN

(Skuegas komike sian korpon kaj denove diras:)

Idisto. Viro, kiu okupas sin pri idoj. Aŭskultu, Sinjoro, ĉu vi dediĉas vin al zorgado aŭ nutrado de infanoj, aŭ eble via bela ĉarma okupado estas nur fari idojn? *(S-ro Moreno ekridegas. S-ro Kardona restas iom embarasita.)*

KARDONA

Ne, Sinjoro. Mi nur estas adepto de la lingvo nomita Ido.

KIPMAN

Lingvo Ido? Stranga afero!

KARDONA

Ĉu vi neniam aŭdis pri lingvo Ido? Ĝi jam ekzistas de du jaroj!

(Kun tiu ĉi sceno la aktoroj devas fari la rolojn de Kipman kaj Moreno tiamaniere ke oni vidu bone la kontraston de iltaj ideoj kaj tiujn de S-ro Kardona. Dum tiu ĉi parolas serioze kaj fervore defendante siajn ideojn, S-roj Moreno kaj Kipman vidigos naivecon, kiun ili ne sentas, kvazaŭ ili nenion sciis kaj volus nur sin elturni de la afero. Kelkfoje en siaj argumentoj ili deklamas kun emfaza mieno por igi pli komika la situacion).

KIPMAN

Ho, jes! Mi nun rememoras pri lingvo unue nomita Ido, due Ildo, k. t. p., ĉar ĝia nomo ŝanĝiĝis tre ofte.

KARDONA

Nun ĝia definitiva nomo estas Ido.

KIPMAN

Vi, do, jam interkonsentis pri la nomo de via lingvo? Ricevu mian plej koran gratulon.

MORENO

Kaj la mian ankoraŭ pli sinceran.

KIPMAN

La bapto de via infano kostis pli, ol ĝia nasko.

MORENO

Dank' al tio, ke vi havis bonegan patronon: Esperanto

KIPMAN

Kaj tre malbonan baptanton: malkonsento.

KARDONA

Konfesu, Sinjoroj, ke vi nur sentas envion, ĉar Ido superas Esperanton.

KIPMAN

Jes, sendube: nur pro tio, ke Esperanto estas malsupera, vi uzas ĝin kaj parolas nur kun Esperantistoj.

KARDONA

Mi ne parolas Idon, ĉar tie ĉi ne estas Idistoj.

MORENO

Sendube Esperanto estas malbonega; tial vi, por propagandi vian superegan lingvon, diras ke ĝi estas Esperanto reformita: ĉiam antaŭe la nomo de Esperanto por allogi la publikon.

KARDONA

Nu, Sinjoroj, ni ne malpacu: vi ja scias, ke ĉe ni estas la toleremo.

KIPMAN

Jes, la toleremo de la senpoveco.

KARDONA

Senpoveco? Ne, Sinjoro. Nia alero tre prosperas: vi jam alprenas niajn radikojn, niajn suliksojn. Vi, do, venas al ni.

MORENO

Ne, Sinjoro; ni jam iras sur la vojo de 22 jaroj; vi nur iras de du: ni estas tre malproksime kaj ne bezonas rigardi malantaŭen.

KARDONA

Vi tion diras, sed interne vi konsentas, ke ĉe ni estas la progreso. Rimarku nur la alfabeton de Ido: pli simpla, pli internacia, ol la esperanta, sen tiuj teruraj supersignoj...

MORENO

Pardonu, Sinjoro: la ĉapelo sur la kapo de virino tre teruras min en la teatro, ĉar ĝi ne permesas vidi la prezentadon al la malfeliĉaj postsidantaj personoj, sed en la Esperanta alfabeto, kial, do, ni devas forpeli la ĉapelon de la literoj? Ĉu vi ne scias, ke kelkaj literoj estas tre delikataj? Doktoro Zamenhof devis zorgi pri ili kaj surmetis al ili ĉapelon, ĉar tiamaniere ili ne estas jam elmetitaj al la danĝero de malvarmaumo aŭ pulmonio.

KARDONA

Uzu spritaĵojn: tio ne estas argumenti. Vidu ankoraŭ, kiel malbone vi azas la artikolon:

«En la mondo venis nova sento...»

Kial do artikolo *la*? Ĉu ekzistas multaj mondoj inter kiuj oni devas distingi aŭ diferencigi?

MORENO (*mokeme*)

Tio ĉi estas sendube preseraro.

KARDONA (*vive*)

Ne, tute ne, ĉar sekvas tuj:

«Tra la mondo iras forta voko...»

KIPMAN (*pli mokeme*)

Jen alia preseraro. Ĉu la bonaj kompostistoj ne povas erari dufoje?

KARDONA

Vidu alian konvinkan pruvon pri la supereco de Ido. Mi faris Idan trajukon de Esperanta literatura teksteto. Jen estas ambaŭ pecoj. (*Eliras kaj montras al S-roj Kipman kaj Moreno kelkajn paĝerojn.*) La Ida teksto estas pli internacia, pli komprenebla, pli simpla: dum Esperanto uzas en la teksto 317 vortojn, Ido nur bezonas 230. Vidu, kia granda ekonomio!

MORENO

Jes, Sinjoro, tre prave. Tie ĉi en Barcelono estas hotelo, nomita «La familio», en kies tagmanĝoj oni servas al la gastoj kvar pladojn; dume, en hotele «Kolón» (1), oni servas dum tagmanĝo ok pladojn. Sekve, en hotelo «La familio» oni manĝas pli bone, ol en hotelo Kolón.

KARDONA (*akre*)

Nu, kiau rilaton povas havi Ido kun hotelo? Kial kunmiksi stomakon kun lingvo?

KIPMAN (*malflame*)

Bone, bone, Sinjoro. Se la digestado fariĝas al vi malbona, provu, provu tiam konstrui belajn kaj simplajn frazojn!

KARDONA (*nervekscitite*)

Estas neeble diskuti kun vi, Sinjoroj. Vi sendube apartenas al la *Fundamentistoj*.

KIPMAN

Tute ne, Sinjoro, mi ne estas *fundamentisto*.

KARDONA (*al S-ro Kipman*)

Vi, do, estas reformisto?

KIPMAN

Ne mi simple estas profesoro de fortepiano.

(1) Oni elparolu: *Kolón*.

MORENO

Kaj mi agento de asekuroj.

KARDONA (*detenante sian furiozecon*)

Vi nur estas ĉerĉemuloj, kun kiuj estas nesble serioze paroli. Adiaŭ, Sinjoroj.

KIPMAN

Aŭskultu, aŭskultu: bonvolu sciigi nin antaŭtempe, kiam vi havos kongreson de Ido: ni tien iros por revarki vin al Esperanto.

MORENO

Kaj diru al viaj samideanoj, ke vi volis semi nian kampon, sed bedaŭrinde vi trovis ĝin plensemitan kaj ne plu semeblan (*S-ro Kardona foriras nenion respondante kaj S-roj Kipman kaj Moreno ekridegas samtempe.*)

SCENO IV

S-ROJ KIPMAN kaj MORENO

KIPMAN

Estas neelporteblaj tiuj ĉi Idistoj: ili nur volas propagandi sian lingvon inter ni, kvazaŭ la homaro konsistus sole el Esperantistoj.

MORENO

Bedaŭrinde por ili la Esperantistoj restas fidelaj. (*Alproksimigas S-ro Bolin, kiu ekvidante S-ron Moreno salutas lin kun montraj de granda ĝojo.*)

SCENO V

LA SAMAJ kaj S-RO BOLIN

BOLIN (*al S-ro Moreno*)

Ho, mia kara amiko Moreno! Kiel vi fartas? Mi ne vidis vin jam de du tagoj!

MORENO

Mi bone fartas, S-ro Bolin. En tiu ĉi agitega kongresa vivado ne estas malofte pasigi tutan tagon nevidante amikon. Mi havas la honoron prezenti al vi S-ron Kipman, angla tre lerta Esperantisto, ... (*Al S-ro Kipman*) S-ro Bolin, franca Esperantisto, kiun mi konas de du jaroj. (*Ili salutas unu la alian.*)BOLIN (*al S-ro Kipman*)

Mi estas tre feliĉa vin koni, S-ro Kipman.

KIPMAN

Kaj mi ankaŭ, Sinjoro.

MORENO (*al S-ro Boltu*)

Ĉu vi hieraŭ ĉeestis en la «Floraj Ludoj»?

BOLIN

Kompreneble, Sinjoro, mi ĉeestis. Ĝi estis belega festo.

KIPMAN

Sendube ĝi estos rememorinda kaj ĉiujare reokazos. Niaj kataluna samideanoj havis grandan lertecon organizaute tiun ĉarman solenaĵon.

BOLIN

Nur unu detalo malplaĉis al mi kaj pardonu mian sincerecon.

MORENO

Kiel, mia kara?

BOLIN

La premiitaj versaĵoj de la unua konkurso «Poezio pri Amo». Ili estas malbonaj.

KIPMAN

Mi tute malkonsentas. Mi legis kaj trovis ilin belegaj, delikataj, sentoplenaj.

BOLIN

Ne, Sinjoro. La unua premio estas versaĵo taŭganta por infanoj. «Rozujo sovaĝa, simbolo de l' amo...» Paroli en la XX^a centjaro pri rozujo sovaĝa! Nun kiam ĉio estas civilizita, eĉ Nord-Afriko! Kie estas la argumento de la verko, ĉu vi volas al mi diri?

MORENO

Vi ne estas prava, Sinjoro. La versaĵo, kiun vi aludas, estas belega poemo de amo kun tia pura delikateco, ke oni tuj divenas ĝian devenon: koro de virino.

BOLIN

Aŭdante tion mi kredus, ke vi estas samepoka, kiel Homero. Defendi nun tiun ĉi malplenan idealismon! Ne, Sinjoro; la nuntempa poezio estas ankaŭ trafita de la moderna progresado, de la hodiaŭa revolucio. Atentu la duan premion de la konkurso. Junulo trovas virinon kaj enamigas. Poste ŝi mortas kaj li vagas sola... Kia mirinda afero! Krom tio konstatu, ke nuntempe oni ne trovas principojn sur la vojo, kie ŝtonojn.

KIPMAN

La poeto devas vesti belege siajn pensojn: la regiono de poezio ne estas tiu ĉi proza profitama tero, sed tiu blua vastega ĉielo, kiu nin ravas per sia superbeleco. La versaĵo «Sur vojo de l' vivo» esprimas plej deli

kate la staton de juna koro, kiu el pura ĉionforĝesanta feliĉo transiras al la maldoĉa senkonsoleco, kaŭzita de la morta forrabo. Kaj tiu ĉi versaĵo per la alteco de siaj pensoj kaj la taŭga harmonio de la ritmo nin frapas kortuŝe.

BOLIN

Kaj vi kuraĝas nomi harmonia ritmo tion, kio estas nek harmonio, nek ritmo! En tiu ĉi afero ni malsamopiniias. La versfarado, Sinjoro, estas aŭda demando kaj oni devas havi bonajn orelojn.

KIPMAN (*Aanken*)

(Kaj vi havas tiel longajn orelojn, kiel taŭgas al via azeneco!)

BOLIN

La moderna poezio postulas longajn, tre longajn versojn. Alie la aŭdo ne sufiĉe kontentiĝas.

MORENO (*Aanken*)

(Tiu ĉi besto kredas, ke la versoj estas kanoj por fiŝkapti.)

BOLIN

Kaj la argumento de la poemo devas esti afero nuntempa, moderna; ne tiuj bagateloj pri principoj, kaj simboio de l'amo, k. c.

KIPMAN (*Aanken*)

(Tiu ĉi sentaŭgulo pretendas, ke oni faras versojn, kiel ŝtrumpojn, longaj kaj laŭmodaj.)

BOLIN

Mi prezentis al la Floraj Ludoj versaĵon, faritan laŭ tiaj postuloj. Kaj ĝi ricevis nek premion, nek honoran mencion. Tio ĉi estas barbara maljustaĵo!

MORENO (*Aanken*)

(Mi jam komprenas kial vi trovas malbonaj la premiitajn verkojn. Ĉar ili ne estas viaj.)

BOLIN

Kiam mi hieraŭ vidis, ke mia versaĵo estas ne premiita, mi indignegis. Mi volis tuj protesti, sed la okazo ne estis taŭga por tio. Mi eliris el la Borsio, furioza, kun neimagebla malespero kaj tuj min direktis...

KIPMAN

Al la maro por memdroniĝi?

BOLIN

Ne, Sinjoro, mi ne estas tiel malsprita, dank' al Dio. Mi nur iris al la «Paralelo», kie estas kelkaj someraj teatroj. Tien mi iras ĉiuvespere kaj tre amuze pasigas la tempon. Oni prezentas spritajn vodevilojn kaj tre belaj virinoj dancas Andaluŝiajn dancojn. Mia Dio, kia rava spektaklo! (*Esprimas tre vive per gestoj sian entuziasmon por la pritraktita afero.*) La

virinoj estas belegaj: kun ardaĵ okuloj, fajraj lipoj kaj korpo gracia. Kaj kiaj movoj dum la danco! Ili portas tre malpezajn vestojn kaj turniĝas tiel volupte... Mirinde, Sinjoroj, mirinde! Speciale estas ia alta brunulino, kun grandaj okuloj, kiu min trenezigas. Se vi volos ŝin vidi, mi akompanos vin; ŝi konas Esperanton.

MORENO

Jen virino, kiun vi nomus princino kaj al kiu vi verkas belan poemon.

BOLIN

Tre volonte. Por ŝi mi farus ĉion, kion ŝi volus. Mi kantus per versoj la allogecon de ŝiaj okuloj, la ĉarmecon de ŝiaj lipetoj (*gradige laŭtigas la tonon*), la delikatecon de ŝia faciflekso talio, la...

KIPMAN (*intence*)

Ne daŭrigu, Sinjoro. Tio estas jam tro kanti. Vi eble raktiĝus.

BOLIN

La virinoj tre plaĉas al mi, Sinjoroj, pli ol la versoj.

MORENO

Vi ne bezonas tion pruvi. Mi kredas al tiu pliŝato.

BOLIN

Kaj revenante al mia afero. Mi prezentis al la konkurso de la «Floraj Ludoj» versaĵon, kredante al granda sukceso. sed miaj esperoj nur ricevis neatenditan disreviĝon. Mi tuj legos al vi la versaĵon kaj vi mem juĝos. (*Eliras kaj malvolvas grandan paperrulon. S-roj Moreno kaj Kipman faras signojn de teruro, metas la manojn sur la kapon, konvulsi konsternitaj de katastrofo.*)

MORENO (*serce*)

Aŭskultu, Sinjoro, ĉu tio estas manuskripto de versaĵo aŭ traktato pri anatomio?

BOLIN

Kial vi demandas tion? Eble ĉar la verko estas longa? Kompreneble, Sinjoroj, mi estas konsciencia poeto. Por aspiri al premio oni devas fari grandan laboron. Prezenti poemon konsistantan nur el 30 versoj, estas montri senegalajn senhontecon. Mi komencas la legadon: «La perdita mono.»

KIPMAN

Eble vi forgesis, ke la demando estas «Poezio pri Amo». Tiu ĉi titolo...

BOLIN (*nirigita*)

Ĉu vi parolas serioze, Sinjoro? Kio estas nun la amo? Mona, nur mona problemo. Atentu: kiam oni preparas edziĝon, oni unue esploras la disponeblajn rimedojn. Kiam oni amas knabinojn, vi pli celas ŝian

kapitalon, ol ŝian koron. Vi demandas: «ĉu ŝi estas riĉa?» kaj ne: «ĉu ŝi estas bela?» Sekve oni tre amas monon. Kaj oni sentas veran malfeliĉon ĝin perdante.

KIPMAN (*ŝanĝen al S-ro Moreno*)

(Estas neeble diskuti kun tia viro. Kaj la legado de lia longega versaĵo estas neelportebla. Ni pensu kiamaniere oni povas forpeli lin, aŭ alie ni mortos de versatako!) (*Lauĉe al S-ro Bolin.*) Vi estas prava, Sinjoro.

BOLIN

Mi, do, daŭrigas:

» Por min distri mi vespere sur la strato promenadis...

MORENO

Permesu, Sinjoro, ĉu tio estas verso aŭ tuta strofo?

BOLIN

Nur verso: mi jam diris, ke la nuntempa poezio postulas versojn longajn. Vi vidos en mia poemo aliajn pli longajn versojn: el 24 silaboj.

MORENO

Bone, bone; mi nur petas, ke vi sciigu nin ĝustatempe, kiam alvenas la lasta vorto de la versoj kaj tiamaniere ni atendos la rimou.

BOLIN

» Kaj amikon mi nenian renkontadi jen povadis.

» Mi jam laca de promeno miau hejmon revenadis...

KIPMAN (*ŝanĝen*)

(Tio estas terura, mia Dio, mi tuj mortos...) *S-ro Moreno komencas fari falmojn per la kapo kvazaŭ tri ekdormonte.*)

BOLIN

» Kiam ian junulinon en balkono mi vidadis...

Kiel ŝajnas al vi la komenco, Sinjoroj? Ĉu plaĉas al vi tiuj ĉi senintermankaj rimoj en *adis*? Ili tre bonsonas por la orelo.

KIPMAN

Tre belaj, Sinjoro. (*ŝanĝen: Ia pesto vin englutu, turmentistoj!*)

BOLIN

- » Ŝi per blanka vest' vestita, tiam estis parolanta
- » Kun patrino, kiu kudris apud ŝi sur seĝ' sidanta,
- » Kaj de temp' al temp' ŝi estis sur la straton rigardanta
- » Avidege, kvazaŭ estus ŝi fianĉon atendanta.
- » Mi ekhaltis kaj tuj venis al mi lama majnunulo,
- » Kiu petis por almozo, ĉar li estis almozulo,
- » Kaj estante, kiel decas, mi sincera bonkorulo
- » Mi rapidis almozdoni al la kara matriĉulo...

MORENO (*Aŭken*)

(Tio ĉi estas la Tantara turmentego!) (*al S-ro Bolin*) Aŭskultu, Sinjoro: pardonu se mi vin interrompas. Vi jam legis al mi vian beiegan versaĵon, mi konas ĝin parkere. Ankaŭ S-ro Kipman estas konvinkita pri ĝiaj grandaj meritoj. Estas terura maljusteco, ke oni ne aljuĝis al vi la unuan premion, sed mi divenas, kio okazis en tiu ĉi afero.

BOLIN (*kun intereso*)

Kio, do, okazis?

MORENO

Mi kredas, ke via versaĵo eble perdiĝis en la transsendo. Se la juĝantoj estus ĝin ricevintaj, ili sendube pli ŝatus ĝin, ol la premiitajn. Sed la afero estas ankoraŭ riparebla, ĉar S-ro Grabowski, prezidanto de la versa sekcio, estas tie ĉi en Barcelono.

BOLIN

Sed mi ne lin konas.

MORENO

Tio ne malhelpas. Mi konas lin intime. Vi povas viziti lin en mia nomo kaj rakonti al li ĉion. Li sendube faros ĉion eblan por vi. Prenu tiun ĉi rekomendan vizitkarton kaj iru al li. (*Eltras vizitkarton el sia paperujo kaj skribas sur ĝi.*) S-ro Grabowski loĝas en hotelo Falcon (1), en la «Rambla».

BOLIN

Bone, bone, mi tuj iros lin vidi (*volvas la paperrulon*). Adiaŭ, Sinjoroj, ĝis revido (*salutas ilin per manpremo*).

SCENO VI

S-ROJ KIPMAN kaj MORENO

KIPMAN

Mi respiras libere. Sed kion vi faris, S-ro Moreno? Sendi lin al S-ro Grabowski! Ĉu vi scias, ke la eminenta pola Esperantisto terure malamas tiujn ĉi *puctoj-adistojn*?

MORENO

Mi ja scias, ke S-ro Grabowski akceptos lin per bastonbatoj, kiom li aĉdos liajn malbonegajn versaĵojn, sed kion ni povis fari? Lasi nin mortigi per versatenco? Ne, la germanoj bone diras, ke en prava kompatato, oni devas unue kompati sin men. (*S-ro Lopez venas kaj alproksimiĝas saluti S-ron Moreno.*)

(1) Oni elparolu *Fathón*.

SCENO VII

LA SAMAN KAJ S-ro LOPEZ

LOPEZ

Bonaj tagoj, Sinjoro, kiom vi estas trovita?

MORENO (*flanken*)

(Dio min helpu! Jen tiu ĉi sentaŭgulo, kin ne konas eĉ la alfabeton de Esperanto. Se almenaŭ mi povus lin foririgi...) (*Laitte*) Ho, mia kara, jen mi havas la plezuron vin revidi. Ĉu vi ne scias, ke via amiko S-ro Torres tre deziras paroli kun vi pri urga afero?

LOPEZ

Jes, mi finas vidi al li tuj. Kiam estas tiu ĉi viro?

MORENO (*al S-ro Kipman*)

Mi havas la plezuron prezenti al vi mian amikon, S-ron Lopez, hispana Esperantisto... (*al S-ro Lopez*) S-ro Kipman, Prezidanto de la Leeb's'a (trupo. (*Li salutas unu la alian per manpremo.*))

LOPEZ (*al S-ro Kipman*)

Mi tenas granda plezuro, ke mi konas al vi. Ĉi kiom vi venos tien?

KIPMAN (*nenion komprenante kaj embarasita*)

Sinjoro...

LOPEZ (*plilaitigante sian voĉon*)

Diru, Sinjoro: ĉu kiam tagoj vi pensas resti kien? (*S-ro Kipman pli embarasigas: li nescias kion diri. S-ro Moreno detiras nevixdate la veston de S-ro Lopez por komprenigi al li, ke li ne devas daŭrigi.*)

MORENO (*al S-ro Kipman*)

Pardonu, Sinjoro, tiu ĉi nova...

LOPEZ (*interrompas lin per laŭlega voĉo ĉiam parolante al S-ro Kipman*)

Kiel da Esperantistoj estos Kongreso sur vian landon? (*S-ro Kipman restas konfuzegita: li paligas, poste ruĝigas kaj ion post ion vidigas sur sia vizaĝo ĉiujn kolorojn de la dielarko, sed li nenion komprenas kaj silentas. S-ro Moreno faras signojn al S-ro Lopez: por ke li ne parolu, sed vane, ĉar li ne ridas la signojn kaj daŭrigas ĉiam laŭtege.*) Ĉu kies vi respondis min, Sinjoro? Kiu da aŭtograto plumis vin en la Kongreso? (*La embarasa situacio ŝajnas diamdaŭri. S-ro Kipman restas konsternita. S-ro Moreno, ruĝiganta, kiel hontema knabino, ne scias kion fari. Dume S-ro Lopez parolas laŭtege farante almozojn per la brakoj, krazaj li intencus frapi S-ron Kipman.*) Ĉu vin donis al cigareto, kien mi restos.

KIPMAN (*flanken, kun tima mieno*)

(Tiu ĉi viro devas esti freneza. Ĉu li finos min batante, ĉar mi ne respondas? Mi devas voki urbagvardianon por helpo.)

MORENO (*frapita de subita ideo kaptas S-ron Lopez je la brako, kondukas lin flanken, je helkaj paŝoj de S-ro Kipman, kaj parolas kun li*)

Aŭskultu, mia kara, ne parolu plu, ĉu vi ne scias, ke S-ro Kipman estas surdega kaj aŭdas nenion?

LOPEZ

Ha bone. Mi ĵus komprenos. Adiaŭ, mi iras al la Universala Esperantan asocion por mi fari ekzamenon kaj ricevi diplomon ol profesoron de Esperanto. (*Premas la manon de S-ro Moreno kaj foriras.*)

LASTA SCENO

S-ROJ KIPMAN kaj MORENO

MORENO (*revenas al S-ro Kipman*)

Pardonu, Sinjoro. Kiom mi suferis! Tiu ĉi S-ro Lopez nur estas nova Esperantisto, kiu apenaŭ konas la alfabeton de nia lingvo kaj trokuragas parolante al ĉiuj renkontitaj fremduloj. Vi sendube komprenis la aferon.

KIPMAN

Ne, ne. Mi kredis, ke li nur estas frenezulo. Mi jam estis preta voki urbagvardiaĵon, ĉar lia mieno kaj movoj de la brakoj estis tre minacaj. Sed kiel vi forpelis lin.

MORENO

Mi simple diris al li, ke vi estas surdega, ke vi aŭdas nenion.

KIPMAN (*videgante*)

Brave, brave! Dank' al tio, li...

MORENO (*subite interrompas lin kun terurita mteno*)

Aŭskultu, aŭskultu. Jen la petanto de aŭtografoj, kiuj serĉas nin inter la amaso kaj revenas aŭdi vian rakonton pri Port-Arthur.

KIPMAN (*timigite*)

Ne, tute ne. Ni savu nin forkurante. (*Ili rapide foriras brako ĉe brako, kantante: «En la mondon venis nova sento...» La kurteno fulas.*)

FINO

Colección Española «Esperanto»

J. ESPASA É HIJOS, EDITORES, CORTES, 579 — BARCELONA

	Pesetas
N.º 1. Primeras lecciones de «Esperanto», del profesor TH. CART. Traducción de A. L. VILLANUEVA . . .	0'60
N.º 2. Manual y ejercicios de la lengua internacional «Esperanto», por VICENTE INGLADA ORS, capitán de estado mayor, y ANTONIO LÓPEZ VILLANUEVA, profesor normal, con un prólogo de CARLO BOURLET, presidente del Grupo Esperantista de París (2.ª edición)	3'00
N.º 3. Vocabulario Esperanto-Español y Español-Esperanto, por los mismos autores y con un prólogo de P. FRUICIER; nueva edición en 2 volúmenes, notablemente corregida y aumentada. Vocabulario Esperanto-Español.	1'50
Vocabulario Español-Esperanto.	3'50
N.º 4. Curso práctico de Esperanto y Clave de los temas y ejercicios contenidos en el Curso práctico, por los profesores R. DUYOS SENDO, capitán de infantería, y V. INGLADA ORS, capitán de estado mayor, con una carta-recomendación del doctor ZAMENHOF.	3'00
N.º 5. Sintaxis de la lengua internacional «Esperanto», por A. LÓPEZ VILLANUEVA, académico de la misma, secretario del Grupo Esperantista de Murcia, oficial del cuerpo administrativo de Instrucción pública primaria y maestro normal	0'75

Sociedad española

PARA LA PROPAGACIÓN DEL

ESPERANTO

Presidente, MANUEL ESTEBAN — Secretario, CARLOS DUQUESNAY

Cuota anual: 1 peseta

Para informes dirigirse al Secretario

CARLOS DUQUESNAY, ingeniero geógrafo — BURGOS

ACONTECIMIENTO EDITORIAL

Enciclopedia Universal Ilustrada

Obra que en la publicación de sus primeros tomos ha sido juzgada y recompensada con los mayores premios en las últimas Exposiciones de Zaragoza (1903), Valencia (1909), Santiago (1909), Quito (1909), Bruselas (1910) y Valencia (1910)

COLABORACIÓN CIENTÍFICO-LITERARIA UNIVERSAL

— ELEMENTOS DE ESPAÑA, AMÉRICA Y EXTRANJERO —

Etimologías en Sánscrito, Hebreo, Griego, Latín, Árabe, Lenguas indígenas americanas, etc., etc., y **versiones** de la mayoría de las voces en Francés, Italiano, Inglés, Alemán, Portugués, Catalán y Esperanto

10,000

Triple

1.000,000

BIOGRAFÍAS FIGURATIVAMENTE INÉDITAS

NÚMERO DE VOCES QUE LAS CONTENIDAS EN LOS DICCIONARIOS MÁS EXTENSOS

DE OBRAS EN SU SECCIÓN BIBLIOGRÁFICA

— DATO ELOCUENTE —

Los tomos I á X, publicados, contienen 10 500 grabados intercalados; 880 láminas en negro (varias de ellas dobles), que integran 5,000 grabados; 133 láminas en color (muchas de ellas dobles), que contienen 1 450 grabados, y 570 mapas y planos (también en su mayoría dobles).

— CONDICIONES DE LA SUBSCRIPCIÓN —

La *Enciclopedia Espasa* se publica por cuadernos de 80 páginas de dos columnas, ó su equivalente en preciosas láminas, y va impresa con tipos elegantes y en papel satinado expresamente fabricados para esta edición; con el objeto de que la impresión resulte clara, uniforme y perfectamente legible, se hacen las tiradas con tipos siempre nuevos.

Los cuadernos se componen generalmente de pliegos de texto con inmejorables grabados intercalados sacados de fotografías del natural, láminas en negro y un rico mapa en colores ó una preciosa cromolitografía, tricromía, etc., etc. *No obstante la extraordinaria riqueza de las cromolitografías, tricromías, etc., cuyo coste excede del valor de 4 pliegos, SÓLO SE CONSIDERARÁN COMO UN PLIEGO DE TEXTO. Es de notar también que la inmensa mayoría de los mapas, láminas en negro y en colores son dobles, á pesar de lo cual se repartirán como si fuesen una sola lámina.*

1 ó 2 cuadernos por semana; á pesar de su inusitado lujo, el precio de cada cuaderno será de

Una peseta en toda España y 1 franco en el Extranjero

La obra podrá adquirirse asimismo por tomos encuadernados (formados por un número de pliegos, láminas en negro, mapas, cromolitografías, tricromías, etc., etc., de un valor igual al que representan cuando forman cuadernos), al contado ó á pagar en varios plazos mensuales, siendo el precio del tomo, por término medio, 25 PESETAS encuadernado.

Se publican unos 4 tomos por año. Toda la obra constará de 35 á 40 tomos.

Los tomos, encuadernados con ricas tapas iguales á las de los muestreros de lujo, son de gigantes proporciones, en 4.º menor, perfectamente manejables. Dimensiones: 26 X 18 cm.

Se publica por la casa editorial de JOSÉ ESPASA é HIJOS (Cortes, 579, BARCELONA), y se suscribe en las principales librerías y centros de suscripción de España y América

◆ Publicados los tomos I á X ◆ Próximo á terminarse el XI ◆